

La Jubileo Lusin

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 517, 1981.09.24 & 26

Dank' al la belaj eldonaĵoj kaj tutcerte bonaj kaj kompetentaj tradukoj de la Fremdlingva eldonejo de Beijing, Ĉinio, la esperantistoj legemaj intimiĝis kun la novela arto de Lusin.

A.- Pro tio ni ne povas resti senreagaj okaze de la festado de la jubileo de tiu granda ĉina verkisto, kiu naskiĝis fakte antaŭ unu jarcento, la 25-an de septembro 1881. Li mortis 55-jara en 1936.

Cl.- La septembra numero de la revuo EL POPOLA ĈINIO enhavas serion da artikoloj pri la aŭtoro de SOVAĜA HERBARO. 5-paĝa artikolo raportas interese pri "la pozicio de Lusin en la monda literaturo", alia artikolo preskaŭ same longa parolas pri Lusin kaj Esperanto, kaj aŭtobiografio de Lusin donas ideon pri la vivo de tiu, kiun Ĉinio nuntempe honoras kiel la "ĉefkomandanton de la ĉina kultura revolucio", rememorigante, ke Lusin "estis ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciulo" laŭ la vortoj mem de Mao Zedong.

A.- Ni multe kuraĝigas vin akiri kaj konservi tiun septembran numeron de EL POPOLA ĈINIO kaj ankaŭ relegi aŭ eklegi la novelojn de Lusin, kiuj ekzistas en esperanto en plena kolekto bele ilustrita. Kaj vi sciu, ke ĵus aperis esperantigo de lia proza poemaro „Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero“.

Cl.- Ni hodiaŭ resume citos erojn el la artikoloj de EL POPOLA ĈINIO, por iel komprenigi, ke ankaŭ en Svislando Lusin havas admirantojn.

A.- "Lusin okupis gravan lokon en la monda literaturo. En siaj noveloj li sukcese kreis figurojn de personoj el diversaj socitavoloj de la malnova Ĉinio, precipe tiujn de laboruloj kaj virinoj en senrajta pozicio, priskribis la vivon kaj suferojn de la popolo kaj ĝuste spegulis la realon de la malnova socio.

C1.- "En la fino de la dudekaj jaroj kaj la komenco de la tridekaj jaroj, li aktive partoprenis en la literaturaj kaj artaj aktivecoj de ĉinaj maldekstraj verkistoj.

A.- Lusin donis al la monda literaturo du novelarojn "Krioj" kaj "Vagado", du prozpoemarojn "Sovaĝa Herbaro" kaj "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero", malnovajn legendojn nove redaktitajn kaj 14 esarojn. Lia ĉefverko - la satira novelo "La Ĉefa Historio de A-Q" estis tradukita en la lingvojn anglan, francan, rusan, japanan, germanan kaj esperantan antaŭ lia morto, kaj per tio havigis al li renomon en la internacia literaturo. La franca verkisto Romain Rolland alte taksis tiun ĉi verkon, dirante interalie, ke "ĝi estas realisma arta majstraĵo klara kaj riĉa je satireco..." kaj ke "la kompatinda figuro de A-Q restos longe en la memoro de homoj."

Cl.- Lu Sin ne nur verkis originale. Per tradukoj li multe kontribuis al la malfermo de Ĉinio al la fremdlandaj literaturoj. Tiuj tradukoj multe influis la modernan ĉinan literaturon. Estas fakte kiam li studis en Japanio, ke li komencis tiun tradukan laboron, per la ĉinigo de verkoj de Jules Verne "De la Tero al la Luno" kaj "Vojaĝo al la Centro de la Tero". En siaj traktaĵoj li konigis la vivon kaj verkojn de multaj poetoj, inter kiuj Byron, Shelley, Puŝkin, Lermontov, Mickiewicz, Petöfi. Antaŭ ol eldoni originalajn novelojn, li unue eldonis "Elektitajn Novelojn el Eksterlando". En revuo titolita Tradukoj li konstante alportis novajn sciigojn pri la

fremdlingvaj literaturoj, sin bazante foje sur esperantaj tradukoj por siaj ĉinigoj. Tiel ekzemple estis pri la popola eposo de Petőfi "Johano la Brava", por kiu esperanto peradis inter la hungara kaj ĉina lingvoj.

A.- Laŭ nekompleta statistiko Lusin tradukis fakte pli ol 200 verkojn de ĉirkaŭ cent aŭtoroj verkintaj en la lingvoj rusa, japana, angla, franca, germana nederlanda, hispana, finna, pola, ĉeĥa, hungara, rumana kaj bulgara. Inter tiuj tradukaĵoj troviĝas romanoj, noveloj, poemoj, dramoj, fabeloj kaj verkoj pri literatura kaj arta teorio.

Cl.- Lusin mem havis multajn rilatojn kun verkistoj en la tuta mondo, kun ĉinologoj, literaturistoj, artistoj, ĵurnalistoj kaj eldonistoj. Kaj tiuj kontaktoj ne nur favoris la penetron en Ĉinion de fremdaj literaturaĵoj, sed liveris temojn al okcidentaj verkistoj. Lusin estas do unu el tiuj homoj per kiuj la kulturaj rilatoj okazas. Oni do komprenas, ke li interesigis pri esperanto. Tiurilate ni menciis, ke li estis la amiko de la blinda verkisto Eroŝenko, kaj ke tiu rusa esploristo loĝis ĉe Lusin ĉirkaŭ dek monatojn. Novelo de Lusin, "La Komedio de la Anasoj" rememorigas tiun amikecon kun la rusa esperantisto.

A.- Foliumante la taglibrojn aŭ verkojn de Lusin, laŭ EL POPOLA ĈINIO oni facile rimarkas, ke Lusin kontaktiĝis kaj korespondis kun multaj esperantistoj, kaj ke lia subteno al la esperanto-movado estas tre diversa. Li ekzemple faris donacojn al la esperanto-lernejo de Beijing, al la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj la la esperanto-gazeto "La Mondo" eldonita en Ŝanhajo, kie li loĝis.

Cl.- Instruante en la Pekina Esperanta Kolegio, li instigis la lernantojn traduki ĉinen esperantajn literaturaĵojn opinante, ke tio estas unu el la fundamentaj laboroj por la disvolviĝo de esperanto, kaj li subtenis la esperantistojn, kiuj laboris al tiuj ĉinigoj.

A.- Tiurilate ni raportu, kion diras EL POPOLA ĈINIO koncerne la laboron de la poŝtisto Sun Yong, kiu, "post memlernado de esperanto tradukis" en la ĉinan el esperanto epepeon "Johano la Brava" de la fama hungara poeto Petőfi. Li sendis la manuskripton al Lusin, kaj tiu lasta serioze reviziis ĝin. La traduko en la ĉina aperis dank al la helpo de Lusin, kaj Sun Yong poste elesperantigis 40 poemojn de Petőfi, la romanon de Puŝkin "Kapitanfilino" kaj diversajn aliajn verkojn.

C1.- Kiam ni partoprenas la jubileadon de Lusin, ni do ne nur reliefigas la literaturistan aktivecon de la granda ĉina verkisto, sed ankaŭ lian poresperantan agadon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo!